

Eŭropa Bulteno

OKTOBRO 2010, N° 10 (98)

- [La nuna Esperanto movado en Ĉeĥio](#)
- [Laborprogramo de EEU por 2011](#)
- [Nova franca ministra dekreto - ŝancego por Esperanto](#)
- [Libroekspozicieto en Bruselo okaze de eŭropa lingva tago](#)
- [Alvoko al franclingvano](#)
- [Interasocia renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe mediteraneo](#)
- [Torpedo 6 en Herzberg - esperanto-urbo](#)
- [Kvar klasoj – kvar landoj](#)
- [Esperanto ĉe Eurotalk](#)
- [Internacia e-semajno de la kulturo kaj turismo](#)
- [Pola hejma milito](#)
- [En Sarajevo ronda tablo »eŭropa Unio – hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ – lingvaj kaj kulturaj aspektoj](#)
- [La eŭropa komisiono respondis al EDE pri lingva reĝimo de patentoj](#)
- [Wikitrans daŭre rekordas](#)
- [Biografio de Robert Schuman](#)

E-movadoj en unuopaj landoj de EU

LA NUNA ESPERANTO MOVADO EN ĈEĤIO



La ĉeĥa Esperanto-movado konsistas el pluraj sendependaj organizaĵoj, kiuj bone kaj harmonie kunlaboras. Mi do ĉi tie strebos prezenti al vi koncize ĉiujn (almenaŭ tiujn al mi konatajn) kun prezento de iliaj ĉefaj agadoj.

Sendube la plej grava kaj ankaŭ la plej multnombra estas **Ĉeĥa Esperanto-Asocio** (ĈEA). Ĝi konsistas el individuaj membroj, tamen ene de ĝi laboras kaj lokaj kluboj de Esperanto, kaj kelkaj fakaj sekcioj. Ĝi ankaŭ

eldonas kvarfoje jare presitan organon „Starto“ kaj neregule (laŭbezono) „ĈEA-retkomunikoj“ (kiuj estas senpage sendataj al ĉiuj interesatoj, ne nur al la membroj, ankaŭ eksterlanden). ĈEA mastrumas propran bibliotekon kaj libroservon proponanta literaturon en Esperanto al siaj membroj, organizas ĉiun trian jaron kongreson, en kiu estas krom alie elektata nova komitato de ĈEA, kaj en la jaroj inter la kongresoj organizas konferencojn kun simile riĉa programo, krom la balotoj.

Inter la aktivecoj de ĈEA menciindas ankaŭ aparta okupiĝo pri komputila klerigado de la membraro, kontribuado al Vikipedio, komputila prilaboro de historio de la enlanda movado, ciferecigado de Esperanto-literaturo kaj kantotekstoj, kreado de plurmediaj dokumentoj en Esperanto kaj esperantigado de oficialaj urbaj kaj turismaj retejoj (ĝis nun 15 - en tiu fako plej verŝajne Ĉeĥio okupas la unuan lokon en la mondo).

ĈEA estas kolektiva membro de Universala Esperanto-Asocio (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio estas Lucie Karešová, komitatano A por Ĉeĥio Libuše Hýblová), sed ankaŭ de Eŭropa Esperanto-Unio (assembleano Petro Chrdle). La sekcioj de ĈEA estas samtempe ĉeĥaj sekcioj de koncernaj internaciaj



Esperanto-asocioj: pedagogia sekcio agas ene de ILEI, sekcio de nevidantoj ene de LIBE, katolika sekcio ene de IKUE kaj kristana sekcio ene de KELI.

Sur la foto estas la nuna komitato de ĈEA. Malantaŭe de maldekstre: sekretario Pavel Polnický, vicprezidantoj Jiří Tomeček kaj Petro Chrdle, malantaŭe prezidanto Jana Melichárková, prezidanto de Kontrola grupo Libuše Dvořáková, kaj komitat-membroj Libuše Hýblová, Pavla Dvořáková kaj Miroslav Malovec. »



Ĉeĥa Esperanto-Junularo: La junulara Esperanto-movado tradicie ludas en Ĉeĥio gravan rolon. Tuj dum sia fondiĝo la nuna ĈEA kreis junularan sekcion, kiu estis eĉ bone reprezentita en la komitato de TEJO. Ĝia agado estis riĉa, tamen la junaj esperantistoj forgesis pri la necesa varbado inter eĉ pli junaj. Do post kiam la kerno de la membroj de la junulara sekcio en naŭdekaj jaroj transiris la aĝlimon, la sekcio devis esti nuligita. Sed venis novaj aktivaj junuloj, kiuj lernis Esperanton plejparte per Interreto, kaj en junio 2005 ili fondis junularan asocion, ĉi-foje jure memstaran, kun la nomo Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ). Nun en ĝi membras proksimume 100 gejunuloj, ĝi estas kolektiva membro de TEJO kaj vigle aktivas. La plej videbla de la agadoj de ĈEJ estis la organizo de la Internacia Junulara Kongreso en 2009 en Liberec (organizita komune kun GEJ kaj PEJ), kiu altiris en Ĉeĥion 343 junajn esperantistojn el 5 kontinentoj. Sur la dekstra bildo estas la fonda prezidanto



Marek Blahuš, Daša Chvátalová

Dagmar Chvátalová kaj la dua prezidanto kaj nuna komitatano de TEJO Marek Blahuš, sur la maldekstra foto la nuna prezidanto Dan Mrázek.



Skokovy kaj unufoje monate sabatan en Prago. La prezidanto estas Pavel Nechvíle. Sur la foto partoprenintoj de la buskaravano al UK en Bjalistoko organizita de AEH.

Alia menciinda memstara Asocio estas ĈeFEA (**Ĉeĥa Fervojistia Esperanto-Asocio**), kiu origine agis kiel fervojista sekcio de ĈEA kaj jure memstariĝis en la jaro 2009. Ĝi estas samtempe ĉeĥa sekcio de IFEF. En la jaro 2011 ĝi organizos en Liberec Internacian Fervojistan Kongreson. La ĉeĥaj esperantistoj daŭre apartenas al la kernaj agantoj ene de IFEF: nun Jindřich Tomíšek plenumas la funkcion de ĝia ĉefdelegito, Ladislav Kovář gvidas ĝian fake-aplikan grupon de faka sekcio kaj redaktas Fervojfakajn kajerojn, Zdeněk Polák kaj Jaroslav Matuška laboras en Terminara komisiono.

Ĉiuj tri asocioj, kvankam jure memstaraj, proksime kunlaboras kun ĈEA. Krom ili ekzistas pluraj neformalaj grupoj de esperantistoj, ĉefe en Prago kaj Brno. Kaj mi kuraĝas ĉi tien envicigi ankaŭ la civitanan societeton „E-lingvo“, kvankam ĝi en la statuto uzas eĉ ne unufoje la terminon „Esperanto“ kaj parolas pri „eŭrolingvo“, tamen ĝia celo, nome eblo de internacia interkompreniĝo helpe de neŭtrala (do ne-nacia) lingvo, kongruas kun tiu de la Esperanto-movado.

Krom la menciitaj ĈEA kaj ĈEJ ekzistas en Ĉeĥio ankaŭ aliaj jure memstaraj Esperanto-Asocioj, el kiuj necesas menci i unuavice **Asocion de Esperantistaj Handikapuloj (AEH)**, kiu agas plejparte kunlabore kun la Esperanto-Klubo de Stanislav Schulhof en Pardubice kaj havas ankaŭ multajn eksterlandajn membrojn. Ĝi eldonas organon „Informilo“ kun ties kompletiga gazeto „Antaŭen“ kaj organizas regulajn lingvajn seminariojn, kutime dufoje jare tutsemajnan en

La muzeo de Esperanto en Svitavy estas mastrumata de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed mi dediĉas al ĝi specifan lokon, ĉar temas ja pri elstara ekstermovada afero, kiu tre bone servas al la plej bezonata ago: disvastigado de informoj pri la historio, sed ankaŭ pri la nuna stato kaj ebloj de la internacia lingvo Esperanto. Ĝi estas lokita en la Ottendorfer-biblioteko, unu el la plej belaj historiaj domoj en Svitavy, kaj ĝi bone kunlaboras ne nur kun la posedanto de la domo (la urbo Svitavy pere de la Urba muzeo kaj galerio) sed ankaŭ kun la Urba muzeo en Česká Třebová, kiu posedas riĉan Esperanto-kolekton, sed ne disponas pri ekspoziciejo. Cetere, la plej admirata eksponato en la Esperanto-muzeo Svitavy, nome la busto de L. L. Zamenhof (videbla pli supre meze de la komitatanoj de ĈEA) estas pruntedonita tien el Česká Třebová. Ankaŭ kun la ceteraj Esperanto-muzeoj kaj bibliotekoj en la mondo ĝi estas en bonaj rilatoj.



La Esperanto-muzeo ne estas nura deponejo kaj ekspoziciejo de Esperanto-antikvaĵoj, sed ĝi strebas esti viva edukejo, danke al la riĉa Esperanto-biblioteko, danke al komputilo por esplorantoj ekipita per utilaj datenoj (inter alie per granda elektronika Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaro) kaj danke al plurmedia inform-panelo kun tuŝekrano servanta ĉefe por vizitantoj.

Fine de la prezento de Ĉeĥa Esperanto-Movado mi nomu la ĉeĥajn reprezentantojn en internaciaj Esperanto organizaĵoj. Krom tiuj pli supre menciitaj en UEA, TEJO kaj IFEF, Miloslav Šváček, prezidanto de Katolika sekcio de ĈEA, plenumas jam duan elektoperiodon funkcion de prezidanto de IKUE kaj Pavel

Polnický, prezidanto de Kristana sekcio de ĈEA funkcion de sekretario de KELI.

Parolante pri Esperanto-movado en Ĉeĥio necesas menci ankaŭ Kongresan kaj klerigan agentejon KAVA-PECH kaj samnoman eldonejon, kiu apud la ĉeĥa, angla kaj germana lingvoj uzas pro profesiaj celoj samrajte ankaŭ Esperanton. Ĝi vigle aktivis ankaŭ por esperantistoj, kaj inter pli ol 130 libroj sub la propra ISBN eldonis 57 en Esperanto. Krome ĝi produktas librojn laŭmende por klientoj el pluraj landoj (FR, DE, ES, NL, SE, KR) inter ili ankaŭ la librojn en Esperanto.

Pli da informoj pri la Ĉeĥa Esperanto-Movado vi trovos ĉe www.esperanto.cz, pri Esperanto-libroj kaj aranĝoj de KAVA-PECH ĉe www.kava-pech.cz/esperanto.

Petro Chrdle

LABORPROGRAMO DE EEU POR 2011

EEU devis ĝis la 15-a de oktobro sendi al Eŭropa Komisiono (EACEA) programon por 2011 kun la peto estis kunfinancata. Tial ni devis ellabori nian laborplanon por 2011 kaj jen produkto de skribaj diskutoj kaj korespondado inter la estraranoj:

EEU planas en 2011 jenajn aktivadojn, kiujn ni kompletigos baze de rimarkoj kaj proponoj de la assembleanoj:

1. Eŭropa konferenco pri la temo "Multlingveco kaj eŭropa lingva politiko - ĉu EU povas ĉerpi el spertoj de aliaj multpopolaj ŝtatoj - aparte Indonezio?", Kopenhago 25-27. julio 2011
2. Antaŭprepara eŭropa konferenco por la Eŭropa Jaro de Aktiva Maljuniĝado kaj Solidareco inter Generacioj (2012) kun la temo "Lerni lingvojn por aktivi dum maljuniĝo" 8-10.09.2011 en Krynica (Pollando)
3. Eŭropa Konferenco pri la temo "Junulara moveblo kaj amatora agado en interreto" 11.7-13.07.2011 en Modra Harmonia (Slovakio)
4. Redaktado de informbulteno en Esperanto pri aktivado de Eŭropa Unio dum Hungario prezidas la Konsilion de Eŭropo (I-VI 2011), ĝia aperigo en la paĝaro de EEU kaj retraduko al 6 naciaj lingvoj (sk, si, cz, pl, nl kaj it). Starigo de kontakto al tiu paĝaro far oficiala paĝaro www.EU2011.hu
5. Eldono de DVD-disko kun eŭropaj simboloj kaj valoroj laŭ la provpaĝaro jam farita ĉe www.wix.com/dtislar/europa je 1500 ekz por disdono al Eŭropaj Parlamentanoj, kaj aro da neregistaraj organizoj
6. Organizo de interretaj konsultiĝoj inter la membraro kun la celo kolekti datumojn por Eŭropa Lingva



- Observatorio, kiun planas efektiviĝi Eŭropa Platformo por multlingveco
7. Organizo de Podia Diskuto en Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) 8-10.09.2011 kun la temo "Lingvaj problemoj kadre de eŭropa amatora kunlaboro"
 8. Partopreno de EEU-representantoj en proksimume 20 diversaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn
 9. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en deko da konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU
 10. Informado de membroj de Eŭropa Parlamento dufoje en la jaro pri Esperanto-rilataj eventoj aŭ temoj:
 - a. disdonado de la DVD kun eŭropaj valoroj kaj simboloj en 24 lingvoj (inter kiuj Esperanto)
 - b. invito partopreni en UK kaj konferenco pri Eŭropa Lingva Politiko en Kopenhago
 11. Kontakti slovakajn kaj slovenajn registaron por instigi iun el ili aŭ ambaŭ kunvoki regionan interregistaran konferencon pri eŭropa lingva politiko
 12. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26. sept): publikaj prelegoj pri lingva stato en Eŭropo, ekspozicioj pri Esperanto, lingvaj festival(et)oj, aperigo de iu nacilingva libro aŭ broŝuro pri lingvaj demandoj aŭ Esperanto...
 13. Iniciati agadojn far landaj Asocioj okaze de Tago de Gepatraj lingvoj (21. februaro): publikaj prelegoj kaj rondaj tabloj pri endanĝerigitaj lingvoj en la mondo. Prepari ekzemplan prelegon pri tio.
 14. Intertrakti kaj proponi helpon al urbestro de Herzberg por atingi ke iu alia eŭropa urbo ankaŭ proklamu sin "Esperanto-urbo" (ŝancoj estas ĉe pola urbo Gora, ĝemelurbo de Herzberg) por tiel ekhavi reton de E-urboj.
 15. Iniciati kaj stimuli la tutan esperantistaron en EU partopreni en diskutoj kaj debatoj pri eŭropaj temoj, pri eŭropa estonto, identeco, lingvo... ĉiam kiam iu organizo aŭ EU entreprenas tian publikan eventon.
 16. Disvastigi inter la membraro, sed ankaŭ ĝenerale al publiko en unuopaj ŝtatoj rezultojn de antaŭaj konferencoj de EEU pri Interkultura dialogo kaj komunikado, pri du-kaj plurlingva edukado, pri eŭropaj valoroj kaj simboloj kaj pri eŭropa lingva politiko (post ĝia okazigo en 2011)
 17. EEU kunlaboros kaj reprezentantoj de EEU partoprenos en aranĝoj de diversaj internaciaj kaj eŭropaj organizoj kiel UEA, TEJO, SAT, Le Monde Diplomatique, EDE, AEK, IKEL...
 18. EEU pere de siaj reprezentantoj plu aktivos en laboro de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por Antaŭenigo de Multlingveco, kadre de ĉiuj kvar laborgrupoj (por Instruado de fremdlingvoj, por multlingveco kaj socia integriĝo, por tradukado kaj terminologio kaj por lingva planado kaj lingva politiko).
 19. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 10 paĝoj) en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro
 20. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU www.europo.eu (renovigita en 2010)
 21. Organizati kaj prepari Jarasembleon de EEU en Kopenhago kaj du estrarkunvenojn (en Kopenhago kaj Bruselo)
 22. Prepari la 9-an kongreson de EEU. Fondi Lokan Kongresan Komitaton en Galway (Irlando), kontakti diversajn landajn instancojn, peti kunfinancadon, komenci informadon kaj varbadon. La kongreso okazos en julio 2012.



RIMARKIGO: la planata konferenco en Hamburgo NE OKAZOS. Malgraŭ multaj klopodoj kaj projektverkadoj, interparoloj, neniu instanco de EU aŭ Germanio pretis kunfinanci la konferencon kaj interkonsente kun la Hamburga E-societo en septembro ni decidis nuligi la aranĝon. Ekzistas espero tamen aranĝi la konferencon iam en pli estonto, eble en alia loko.

Maja Tišljar

Nova franca ministra dekreto - ŝancego por Esperanto



Pro informiĝo de franca studento pri la ebloj ekzameniĝi pri Esperanto je B2-nivelo ni komencis enketadi pri la kialo kaj trovis ke ekde la 1a de junio 2010 ekfunkciis [nova leĝo](#) en Francio, laŭ kiu estonta instruisto por ricevi postenojn devas sukcesi ne nur en la dungo-konkurso, sed devas havi ankaŭ diplomojn pri la lingvaj konoj kaj informatiko. La niveloj oni difinis laŭ la referenckadro, ĝi estas B2 kaj la diplomo akireblas pri ajna lingvo, kaj povas esti eldonita en Francio kaj en aliaj eŭropuniaj landoj. Tio signifas por ni ke Esperanto povos havi grandan rolon en Francio. En Hungario pro la samaj kialoj jare 5000 personoj elektas ekzameniĝi pri Eo.

Se francoj sukcesos bone organizi la informadon pri Esperanto, lanĉi altnivelajn kursojn en la urboj kun universitatoj kaj poste se ni poste flekse sukcesos organizi por ili KER-ekzamenojn, Esperanto subite ekhavas grandegan reputacion en Francio.

Grandiĝos la rolo de Esperanto-instruado, necesos pli da bonaj instruistoj, materialoj, kursoj. La retejo [www.edukado.net](#) kaj ĝia baldaŭ [RITE-trejnado](#) povos multe helpi en tiuj bezonoj.

Bonvolu kontakti junulojn, instigi ilin al lernado kaj ekzameniĝo.

Tempe kaj geografie **la plej proksimaj ebloj** estas

- 30 decembro 2010 - en Saarbrücken dum la [Novjara Renkontiĝo](#)
- 24 aprilo 2011 – en Sete dum la [Interasocia Renkontiĝo](#)
- Fine de aŭgusto 2011 – en Torino dum la [78a Itala Kongreso](#)

Ni tre fieras ke ni havas la [KER-sistemon](#) kaj tiel povos helpi en tio, ke en Francio Esperanto ekhavu grandan prestiĝon kaj popularecon.

Se vi havas opinion pri la temo kaj volas dividi ĝin kun ni, bv. viziti la koncernan parton de la [Forumo](#).

Katalin KOVACS

LIBROEKSPOZICIETO EN BRUSELO OKAZE DE EŬROPA LINGVA TAGO



Mi sentas ian ĝeneralan plibonigon de la sinteno al Esperanto ene de la Eŭropa Komisiono. Ekz. okazis kunveno de la Platformo pri multlingvismo la 27-an de septembro kaj neniu plendis pro nia forta rekomendo de "Springboard" en la raporto, kaj mi substrekis tion parole dum la kunveno. Hieraŭ ili eĉ invitis nin aldoni Esperanto-tablon al eta ekspozicio de "konversaciaj tabloj" de pluraj lingvoj okaze de la Europa Tago de la Lingvoj en DGT de la Eŭropa Komisiono en Bruselo. Ankaŭ estis itala, nederlanda, franca, germana ktp tabloj. Ni estis 4 esperantistoj ĉe la E-tablo, kaj venis kolegoj peti informon pri Esperanto kaj rigardi la multajn librojn kiujn ni montris. Aldone, je mia grandega miro, kiam mi alportis mian personan ekzempleron de la enciklopedio de originala

literaturo en Esperanto de Geoffrey Sutton, tiu libro jam estis en la ĝenerala ekspozicio de lingvolerniloj!! La biblioteko de DGT de la Komisiono mem aĉetis ĝin! Mi pensis ke mi sonĝas.

Sean O Riain

ALVOKO AL FRANCLINGVANOJ

Nia malavara mecenato Etsuo Miyoshi prelegos en pluraj francaj urboj en novembro. Jen lia alvoko adresita al franclingvanoj:

Ni ĉiuj konscias pri la granda influo, kiun amaskomunikiloj havas, kiom ŝlosilaj ili estas en la mondo ĝenerale. En nia kazo, pere de ilia voĉo la ekstera mondo ricevadas informojn pri nia agado, pri nia kontribuo al la monda paco kaj nia engaĝiĝo pri lingvaj temoj. Gravas, do, ke ili komprenigu ankaŭ al EU la rolon de Esperanto. Mia agado en Francio estas informa por vekii iliajn amaskomunikilojn pri la EU-lingva problemo. Tiu lando estas ja grava, prestiĝa kaj potenca ne nur en EU, sed ankaŭ mondscale. Ĝi estas, krome, influhava, ĉar la franca estis konsiderata internacia lingvo. La voĉo de Francio estas plu aŭdata tra nia tuta planedo kun respekto. Jam 8 jarojn mi aperigas anoncojn plurlande en Eŭropo, el kiuj 9-foje en Francio. Ili estis sub la rubriko

'Reklamoj', sed mi deziras, ke Esperanto estu traktata kiel novaĵo. Dum mia lastjuna vizito al 'Le Monde' oni sciigis al mi, ke por ke Esperanto estu novaĵo, la ĵurnalo devas konscii pri vera intereso en la publiko. Tion ili taksas pere de reagoj de la legantoj. La 15-an de decembro en 'Le Monde' aperos denova reklamo. Temos pri 2 paĝoj: unu kun intervjuo al la nepo de d-ro Zamenhof kaj alia kun informoj pri Esperanto. Lerninte, ke Ĝingis-Hano breĉis nur 5-metre la Grandan Muron por ĉevaloj kaj venkis Ĉinion dum palpebrumo, mi invitas vin agi same. Jen, do, mia alvoko al vi, franclingvaj Esperantistoj: post la apero de la 2-paĝa anonco bv reagi al la redaktejo de 'Le Monde' papere al: Le Monde, 80 Bd Auguste Blanqui, 75707 Paris Cedex 13 aŭ rete al courrier-des-lecteurs@lemonde.fr. Invitu ankaŭ viajn familianojn kaj geamikojn agi same. Bv skribi NUR franclingve kaj petu, ekzemple, informojn pri denaskuloj, Eŭropa lingva diverseco kaj Esperanto, ĉu daŭra EU-angliĝo taŭgas?, aperigo de pliaj informoj pri Esperanto, ĝia literaturo, ktp. Ankaŭ kritikaj opinioj bonvenas / bezonatas. Mi antaŭdankas pro via apogo.



Etsuo Miyoshi

Henri Masson informis pri la prelegoj de E. Miyoshi:

Parizo (18/11), Vannes (19-20/11), Pluzek (21/11), Lyon (22/11), Avignon (23/11), Montpellier (24/11), Mulhouse (25/11) kaj Thionville (26/11). Lia prelego estos tiam "Ĉu guto traboras la monton ranitan?"

INTERASOCIA RENKONTIĜO 2011 DE ESPERANTO ĈE MEDITERANEO

Dum la Paskosemajnfino de vendredo la 22-a ĝis mardo la 26-a de aprilo 2011, riĉa kultura, kleriga kaj turisma programo atendas vin en ĉarma suna ĉemediteranea havenurbo Seto: temas pri la Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo, kunorganizata de pluraj Esperanto-asocioj agantaj en franclingvio: Esperanto-France, SAT- Amikaro, esperantistaj Fervojistoj, Geinstruistoj, Katolikoj

...

Al la aranĝo invitas Langvedoka-Rusiljona Federacio aganta per LOKO tio estas Loka Organiza KOMitato. La renkontiĝo okazos en Le Lazaret, komforta feriejo en la urbo Seto ĉe Mediteraneo, kiu provizas multajn dormlokojn, surlokan manĝon salonegon kaj kunvenejojn. De la jaro 1978 okazas finaŭguste en Le Lazaret Internacia Semajno de Esperanto. Ĉiutage per duhoraj vizitoj en la naskiĝurbo de Georges Brassens kaj Paul Valéry konatiĝu kun Seto kaj ties ĉirkaŭaĵo. Ĝuu ankaŭ la mediteraneajn specialaĵojn kaj la buntan bazon. Marde vi povos elekti inter tri tuttagaj ekskursoj por malkovri iom el multaj kuriozaĵoj de la regiono kun siaj memoraĵoj el antikveco, kaj tradicioj ligitaj al la riĉaĵoj eltiritaj el la maro. Por vesperoj dancigaj aŭ etosigaj prezentiĝos Jacques Yvert, JoMo kaj Solniška, Teatro-Trupo de Tuluzo, FaMo, Kapriol!, Kaj Tiel Plu. Dominique Gautier prezentos sian filmon pri la Esperanto-movado premiere. Unua aliĝperiodo finiĝas je la 30-a de novembro 2010. Grandega rabato por eksterlandanoj! Pliaj informoj kaj aliĝado je <http://esperantosete2011.fr> aŭ je: <http://esperanto.sete2011.free.fr/irem.php?Lingvo=eo&Temo=Bonvenon>

Esperanto-Renkontiĝo ĉe Mediteraneo
Seto de la 22a ĝis la 26a de aprilo 2011

Vendredo 22a en Lazaret 20a 30 Sabato 23a ĝis Comedia 20a

FaMo Esperanto FILMO Dominique Gautier prezentas sian filmon 'Esperanto premiere'

Sabato 23a en teatro Georges Brassens 22a

Jacques Yvert
kantas
Georges Brassens
en Esperanto

Dimanĉo 24a en teatro Georges Brassens 21a

Kapriol! frisa folkmuziko
Kaj Tiel Plu tradicia kataluna/okcitanaj

Lundio 25a en Lazaret 21a

FTT:
Teatro Trupo de Tuluzo
Patric:
okcitana kantisto
JoMo kaj Solniška:
slava etoso

Claude Nourmont

TORPEDO 6 EN HERZBERG - ESPERANTO-URBO



TORPEDO estas mallongigo por nun jam Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia en Esperanto-Urbo kiu okazis inter la 8-a kaj 12-a de oktobro 2010 organizita la 6-an fojon de la jam fama Internacia Centro Herzberg (ICH), gvidata de Petro Zilvar kaj Zsofia Korody. Ĝi estas aranĝo por E-pedagogoj kiu ĉiujare estas dediĉita al alia aktuala temo. Ĉi-jare temis pri helpo al pedagogoj kiuj deziras aranĝi interŝanĝojn kaj vojaĝojn de siaj instruatoj per partopreno en projektoj financataj de EU. Sekve: kiel skribi projekton kaj kie serĉi la fondaĵojn kiuj povus financi tion. Por la pedagogoj la plej interesaj estas fondaĵoj en la kadro de Tutviva Lernad-programo de EU (LongLife Learning), kadre de kiu aparte interesaj estas Comenius-Programo dediĉita al partnera kunlaboro de bazaj kaj mezaj lernejoj, Grundtvig-Programo dediĉita al aranĝoj rilataj al edukado de plenkreskuloj kaj Civitaneco

(Citizenship) dediĉita al aranĝoj kontribuantaj al aktivado de civitanoj ĉu en neregistaraj organizoj ĉu en politika agado kaj al edukado pri eŭropanismo.

Tiuteme la ĉefpreleganto estis Zlatko Tišljari, sperta pri tiu kampo kaj Zsofia Korody. Tamen okazis ankaŭ aliaj prelegoj (de Stefan Mac Gill, Radojica Petrović, Petro Zilvar kaj Kimie Markarian) kaj aranĝoj kiel ekskursetoj, vizitoj, filmvesperoj, interparolo kun la urbestro Walter. Partoprenis 25 personoj el 8 landoj. La temo estis aparte grava, ĉar EU havas finanĉan mekanismon kiu aparte konvenas por aranĝantoj de E-instruado, sed oni devas bone konatiĝi pri la maniero kiel prepari projektojn, akiri partnerecojn kaj trovi konkursojn ĝustatempe. Tial estas bedaŭrinde ke ne partoprenis pli da instruistoj, aparte germanaj.



Dum la aranĝo okazis ankaŭ kunvenoj de la estraro de ILEI.

Zlatko Tišljari

ESPERANTO ĈE EUROTALK

Granda firmao por instruado de lingvoj Eurotalk ofertas ankaŭ Esperanton. En ĝia oferto troviĝas 5 libroj kun kodo-diskoj por komencantoj, por negocado kaj por infanoj. Eblas havigi ankaŭ vortaron. La kosto de la libroj varias inter 20 kaj 30 britaj pundoj.

Vidu ĉe: <http://eurotalk.com/en/store/learn/esperanto>

Zlatko Tišljari

KVAR KLASOJ – KVAR LANDOJ



En urbeto de centra Hungario kolektiĝis dum la lastaj dek tagoj trideko da gelernantoj 10-14-jaraj kune kun siaj instruistoj kaj pliaj gvidantoj. La aranĝo okazis kadre de dujara projekto laŭ la Eŭropa Interŝanĝ-programo Comenius. La projekto atingis sian trikvaronan punkton: la unua renkontiĝo okazis en Polski Trambeŝ (Bulgario), la dua printempe ĉi-jare en Liono, la tria nun en Tiszafured, Hungario, kun la lasta renkontiĝo en Rybnik, Pollando printempe de 2011. La junuloj pretigis koncerton, vizitis interesaĵojn en la regiono, kune kantis kaj desegnis, kaj ĝenerale refortigis la rilatojn, kiuj jam stariĝis inter la grupanoj.

La vojaĝaj kaj pliaj kostoj de tiuj vizitoj estas kovritaj el la projekta budĝeto. Tial indas konigi pli vaste la eblojn kaj devojn por proponi kaj realigi tiajn eŭrope subtenatajn projektojn. Tial ILEI organizis meze de oktobro en Germanio la unuan seminarion pri subvencipetado (SPSP). Partoprenis la lastan tagon de la renkontiĝo en Tiszafured la prezidanto de ILEI, kiu alportis konkretan subtenon por la projekto, en la formo de ekzempleroj de la revuo Juna amiko, kiu dediĉis plurajn paĝojn al raporto pri la antaŭa renkontiĝo en Francio, kaj kiu certe raportos simile pri la nuna aranĝo – ĉar la instruistino de la nuna gastiga grupo fariĝas redaktoro de tiu revuo.

Praktika rezulto de la ILEI-vizito estas antaŭenirigo de la planoj nomi reprezentanton de ILEI en Bulgario, kio estas la unua paŝo survoje al la starigo de Landa Sekcio. ILEI jam havas sekciojn en la ceteraj tri projekt-landoj. Certe aperos pli detala raporto verkita de la organizintoj; ILEI volonte diskonigos ankaŭ tion.

Stefan MacGill

Prezidanto de ILEI

Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

La 19-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo, okazos en Malgrat de Mar (Barcelona) de la 1-a de Oktobro ĝis la 8-a de Oktobro 2011.

De la 2a ĝis la 9a de Oktobro 2010 okazis la 18a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Coma-Ruga (El Vendrell, Baix Penedès, Tarragona).

Okaze de ĉi evento, Rafaela Urueña, doktorino pri Juro, membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj, ricevis la prestiĝan premion Ada Sikorska, kiun transdonis al ŝi Gian Carlo Fighiera.

[Kliku ĉi-tie](#) por legi la raporton verkitan de Rafaela Urueña pri la Semajno.





Unu plian fojon, ĉifoje en Coma-Ruga, urbeto apartenanta al Vendrell (Taragono) okazis la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro. La nombro de la partoprenantaro estis tre granda kaj vere internacia, inter ili kelkaj gravaj aktivuloj de nia movado, inter kiuj mi elstarigos d-ron Renato Corsetti.

Post la disdonado de la dokumentoj, en taŭga plastika teko, komenciĝis la kurso de Esperanto, gvidate dum la tuta semajno, de S-ro Marček, kaj vespere la unua interkona vespero, en kiu ni gustumis manĝetaĵon kaj ĉampanon “Esperanto”. Dimanĉe okazis la inaŭguro de la Semajno, prezidata de membro de la Urbokonsilantaro de Vendrell, pro neebla ĉeesto de la Urbestro, kiu sendis salutmesaĝon, tradukitan en Esperanto de S-ro Aragay. S-ro Fighiera

kaj d-ro Corsetti salutis la ĉeestantojn, ĉi lasta, sprite komentariante la ekzistantajn antaŭjuĝojn pri Esperanto. Fine S-ro Torné legis salutmesaĝon de la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. La inaŭguro finiĝis per donaco al la reprezentanto de la Urbestro fare de S-ro Luis Serrano de la fama verko D. Kiĥoto kaj “Esperanto en Katalunio”, kies aŭtoro, S-ro Marco Botella, subskribis. Komprenoble, sekvis la komuna fotado por ĉiama rememoro.

Dum la Semajno ni ĝuis parton kulturan kaj parton turisman, kvankam turismo ankaŭ estas kulturo. Laŭ la unua flanko la Semajno estis vere riĉenhava kaj mi ne nur elstarigos kelkajn prelegojn, ĉar ĉiuj estis tre interesaj laŭ diversaj vidpunktoj. S-ro Gian Carlo Fighiera, kiu prelegis dufoje, unuafoje dimanĉon mem pri “Kelkaj noveloj de Boccaccio” rakontante temojn de tiuj noveloj sprite kaj vigle, kaj duafoje pri “Rashomon” japana filmo pri la kvar veroj, kies temo multe plaĉis al la aŭskultantoj. D-ro Renato Corsetti, la sekvantan tagon, prelegis pri la interesa temo “Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas paroli ĝin eŭrope”, kiu altiris la atenton de la ĉeestantoj. Aliaj interesaj prelegoj estis tiu de S-ro Löwenstein pri “Romo antaŭ 2000 jaroj”, tiu de s-ro Antonio Marco pri “Centjara datreveno de granda poeto Miguel Hernández” rakontante pri lia vivo kaj poemoj, kaj kelkaj el ili estis deklamitaj de la preleganto.

La geedzoj Michele kaj Hubert montris al ni sur ekrano la diversajn etapojn de la vivo kaj historio en Belgujo per la prelego “Belgujo, lando de arto, scienco kaj folkloro” kaj la geedzoj el Suda Koreio An Jong kaj Ko Kyung, bele koree vestitaj, prelegis pri “Solidareco de Esperanto kaj folkloraj koreaj kantoj, en Esperanto”.

Fine, s-ro Wolfgang Günther prelegis pri “Kiosko de Levante” revuo kiun li mem gvidas kaj eldonas.

Kaj permesu al mi nun diri ion pri la turisma flanko de la Semajno. Laŭ mi estis granda sukceso gvidi nin merkrede dum la tuta tago al Montserrat, historia kaj religia kerno de la katalunoj, kie dum libera tempo, ni havis okazon ĝui la imponan panoramon de la loko kie situas la monaĥejo kaj la diversajn ejojn tie vidindaj: la bazilikon, la muzeon, bibliotekon k.a. La bona vetero, kiu akompanis nin, helpis vidi la panoramon ekde la supra parto kaj komforte promeni laŭvole ĝis la horo de la reiro al Coma Ruga, kaj survoje, halti por viziteto al vinkooperativo.

Aliaj ekskursoj, tiuj duontagaj, estis al Muzeo Pau Casals en la apuda urbeto San Salvador, kie ni vidis la domon de tiu mondfama violonĉelisto, kaj la muzeon kiu enhavas muziknotojn kaj muzikaĵojn de Pau Casals. Kiel fina aranĝo ni havis okazon aŭskulti koncerton de esperantista pianisto, kiu tre plaĉis al ni.

La alia duontaga ekskurso estis por viziti la Fondaĵon Apel·les en urbo El Vendrell. Temas pri la domo-muzeo de skulptisto kiu vivis samepoke kun Picasso, kaj kie oni gardas belajn skulptaĵojn en ĝardeno kaj interne de la domo. Ni profitis tiun tagon, por malkovri memortabulon memore de la Semajno apud la Urbodomo kaj kun ĉeesto de la Urbestro de El Vendrell s-ro Benet Jané. Dum libera tempo oni profitis la okazon ekkoni la urbon.

Kiel jam estas tradicio dum la Semajno, oni liveras la Premion Ada Sikorska-Fighiera kaj ĉijare mi havis la honoron ricevi ĝin. Vere por mi estis grava honoro, ĉar ne vane mi konis persone Ada-n kaj eĉ mi ĝuis la amikecon de Ada kaj Gian Carlo Fighiera, komencata ĉefe kiam ili loĝis en Madrido. Do, mi dankas vere tiun premion kiu instigas min daŭrigi la laboron pro Esperanto. Mi ricevis medalon kaj diplomon bele enkadritan.

Ni havis okazon vidi kaj aŭskulti per video la faman operon “La Bohème” vespere, pretigitan de s-ro Maria Ferigle, kaj alian vesperon la Ensemblo “Montjuic” gajigis nin per bela folkloro festo pri havana muziko en la kafejo-salono de la Hotelo “Natura Park”, sidejo de nia Semajno. Bongusta tipa “cremat” (rumo bruligita kun kafe kaj aliaj spicaĵoj) varmigis nian jam varman etoson.

Fine, la lastan vesperon de la Semajno, okazis debato pri la sugestoj por estontaj Semajnoj. Oni pripensis la eblecon ke la elementa kurso, gvidata ĝis nun jam de antaŭaj Semajnoj, estigos mezan kurson, ĉar oni supozas ke ĉiu partoprenanto jam scias Esperanton. Ankaŭ oni sugestis, dum la unua interkona vespero (ĉijare estis du), prezenti la eksterlandanojn aŭ pli bone prezentiĝi unu post la alia, por ke ni ĉiuj konu nin plej bone ekde la unua tago.

Konklude, bona Semajno, ripoziga kaj kleriga samtempe, kaj mi devas denove danki la laboremon de la kunordigantoj de la Semajno, s-roj Serrano, Aragay, Torné kaj Francesc Mas.

M^a Rafaela Urueña

POLA HEJMA MILITO

Pensiga kverelo tiras la atenton de legantoj en membra forumo de la retejo de Libera Folio. En Pollando ekzistas multaj homoj, grupoj, societoj, kiuj laboras ekster la kadroj de la landa E-Asocio. Kelkaj tiuj homoj formis aktivulan rondon "Iniciata Grupo - Esperanto por EU (IGEEU)", kaj i.a. ili kontaktis politikistojn pri eventuala aprobo kaj rekono de Esperanto en ŝtata nivelo. Tiu memstara agado vekis tondran kritikon de la prezidanto de Pola E-Asocio, kiun sekvis serio de rebatoj de ambaŭ flankoj. Dum la diskuto cetere leviĝis ankaŭ pluraj atentindaj subtemoj: - ĉu organizo estas demokratia, se la estraro ignoras la statuton? - ĉu povas/devas esti estrarano de iu landa E-Asocio persono, kiu agnoskas la definitivan venkon de la angla? - ĉu indas labori por akceptigo de Esperanto je ŝtata (kaj ajna) nivelo, se ne jam disponeblas amaso da diplomitaj instruistoj kaj amaso da instrumaterialoj en la koncerna lando? - ĉu havi piramidan landan asocion aŭ prefere federacian strukturon? La tuta fadeno pri pola hejma milito estas legebla ĉe: <http://www.liberafolio.org/Members/Halkom/la-perdita-diskuto-revenas> Pri la tono kaj enhavo de la disputo oni ne povas fieri, tamen indas legi la diskuton, ja similaj al la polaj problemoj bedaŭrinde ekzistas en pluraj aliaj landoj.

Szilvási László

fonto: Ret-Info <http://www.eventoj.hu>

EN SARAJEVO RONDA TABLO »EŬROPA UNIO – HIERAŬ, HODIAŬ, MORGAŬ – LINGVAJ KAJ KULTURAJ ASPEKTOJ



De la 29-a ĝis la 31-a de oktobro 2010 okazis en Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino) Ronda Tablo okaze de 100-jariĝo de Esperanto-movado en tiu lando. Kolektiĝis reprezentantoj el 14 landoj kaj aro da gravaj sciencistoj kaj internaciaj movadaj gvidantoj. Ni povis aŭdi prelegojn de fakuloj kiuj diversmaniere lumigis la temon kaj miaopinie estus grave aperigi kolekton de referaĵoj libroforme kiel grava kontribuo al la tiutema teorio.

La prelegtitoloj mem diras kiel interesa estis la Ronda Tablo:

Michel Duc Goninaz »Kiu(j) lingvo(j) por kia Eŭropo?«

Oscar Puig »Lingvo, nacio, ŝtato«

Maria Butan »Eŭrop-ujo de multkultureco kaj multlingveco«

Fabrizio Pennachietti »Lingva hegemonio pro kultura prestiĝo«

Zlatko Tišljar »Eŭropa identeco kaj lingvoj«

Dorđe Dragojlović »Eŭropa Unio – tentoj de identeco en fono de akulturado«

Istvan Ertl »Lingvaj minoritatoj en Eŭropa Unio«

Nikola Rašić »La romaa: la plej eŭropa lingvo el ĉiuj, sed tamen...«

Eduard Kusters »La belga kompromiso«

Bardhyl Selimi »Albanoj – estontaj civitanoj de EU – kion ili alportas?«

Barbara Pietrzak »Unuiĝintaj en diverseco – Esperanto por ver-konformigi tiun devizon«

Laszlo Gados »Kial EU ne povas oficiale havi komunan peran lingvon?«

Boĵidar Leonov »Lingva problemo en la patent- kaj sciencetnika informado«

Post ĉiu referaĵo estis vigla diskuto kaj mi notas ĉi tie nur kelkajn por mi tre interesajn datojn aŭ diskutojn aŭditajn sen aparta ordigo:

En 1861 nur 2,5% da italoj regis la italan lingvon (Pennachiatti)

Britio elspezas jare por instrui fremdlingvojn 2 miliardojn da eŭroj kaj Francio 8 miliardojn. Samtempe Britio enspezas pro tio 10-13 miliardojn jare (Duc Goninaz)

Ĉiu lingvo dependas de rimedoj por defendi ĝin (Duc Goninaz)

Ŝtato kaj nacio: Kian nacion havas urbanoj de slovena urbeto Kobarid, kiuj en la 20-a jarcento ŝanĝis 11-fojojn ŝtaton en kiu ĝi estis?

Solvi eŭropan lingvan demandon oni devus per interŝtata kunordigado – ne je la nivelo de EU (Gados).

Esperantistoj ne komprenas la politikan sferon kaj misagas en tiu kampo (Ĉolić).



Krom la rondtabla intensa laboro en moderna hotelo Terme en Ilidža (parto de Sarajevo) oni dediĉis iom da tempo al solenaĵo okaze de 100-jaroj de la BkH-movado sabaton vespere. Senad Ĉolić prezentis ampleksan referaĵon pri la historio de la movado, kun ĝiaj brilaj punktoj, silentaj fazoj (militoj), solidarecoj de esperantistoj kaj ĝia nova feniksa renaskiĝo.

Plejmulton pri tiu historio mi konis, sed surprizis min la ekscio ke inter 1930 kaj 1941 (do en paca tempo) esperantistoj estis en BkH persekutataj, pluraj enkarcerigitaj kaj oficiale estis malpermesite agi en E-societoj. Tio ne okazis ekzemple al kroata movado kiu aktivis tiutempe en la sama ŝtato Jugoslavio. Ni aŭdis ankaŭ belegan koncerton de bosnia kantistino, specialistino pri tre specifa tradicia kantspeco »sevdalinko«, kiun ĉiuj ĝuis.

Sabaton posttagmeze ni trovis tempon ankaŭ por rapida trarigardo de la urbo Sarajevo. Por eksterlandanoj estas aparte impresa la fakto ke en proksimeco de kelkcent metroj troviĝas ĉefpreĝejoj de kvar religi-organizo: la islama, la katolika, la ortodoksa kaj la juda, kio sendube pruvas la toleron kiun en Bosnio flegis dum jarcentoj la tri popoloj kaj kiun artefarite Miloŝeviĉ detruis dum la lasta milito inter 1992 kaj 1995. Pri la milito restas ne plu multaj eksteraj signoj ĉar la urbo estas grandparte renovigita kaj en la suno ĝi brilis loge. Tamen oni ĉiam ree estas trafata de teruro vidante tabulojn sur domoj antaŭ kiuj pro bomboj estis mortigitaj plurdekoj da simplaj civitanoj. En Sarajevo dum la milito estis mortigitaj 14.000 urbanoj far serbaj taĉmentoj.

La estraranoj de Esperanto-Ligo de BkH fiere montris al ni nove aĉetitan kaj renovigitan ejon (iaman loĝejon) de proksimume 40 kvadrataj metroj kun korto centre de la urbo.

Ĉio vidita montris ke en BkH reekfloris la movado. Plej impresis min ĉeesto de pluraj gejunuloj.

Zlatko Tišljarić

LA EŬROPA KOMISIONO RESPONDIS AL EDE PRI LINGVA REĜIMO DE PATENTOJ

Mi informas vin, ke la 28ana de oktobro la Eŭropa Komisiono respondis al EDE pri ĝia starpunkto koncerne novan lingvan reĝimon sur la kampo de patentjuro. La respondo ne estas surpriza kaj estis antaŭimagebla, sed jam estas bone, ke ili respondis kaj bone notis la EDE-starpunkton. Laŭ la respondo, ŝajnas ke la komisionano Barnier mem legis nian komunikon. Se tio interesas vin, vi povos relegi la komunikon kaj la tutan respondon tie: <http://www.e-d-e.org/Respondo-de-la-Euxropa-Komisiono>

Fabien Tschudy

WIKITRANS DAŬRE REKORDAS

La aŭtomata tradukprogramo de la retejo WikiTrans produktita de dana entrepreno GT sub la gvido de sinjoro Bick daŭre tradukas artikolojn el la anglalingva vikipedio. Ĝi nun jam atingis 2.5 milionojn da artikoloj inter kiuj iom malpli ol 1 miliono jam estas konsulteblaj en la reto, sekve pli ol 6-oblo de la oficiala vikipedio en Esperanto. La aŭtomata tradukprogramo daŭre estas plibonigata kaj la tuta tekstaro ĉiun duan monaton traserĉata per plibonigita versio de la programo, do ĝi daŭre plibonigas sin mem, kondiĉe ke homoj kontribuas tiel ke ili kontrolas artikolojn kaj trovas tipajn erarojn kiujn eblas tuj aŭ relative facile korekti per ne tro granda interveno en la programo.

Mi mem rigardas diversajn artikolojn en WikiTrans sufiĉe ofte kaj mi devas refoje konstati ke mi estas tre kontenta pro la rezulto. Estas malmultaj okazoj kiam la frazoj estas tute nekompreneblaj. Ĝenerale la WikiTrans-vikio helpas al mi multe pli per sia relative kripla lingvaĵo ol la korekta angla kiun mi lernis multege pli longe ol Esperanton, kaj kiun mi multe pli malbone komprenas ol tiun Esperanton de WikiTrans.

Tial mi invitas kaj la Esperantajn vikipediistojn kaj aliajn konsulti WikiTrans kaj korektadi la tekstojn. Indiku la korektaĵojn kaj sendu al sinjoro Bick. Tio helpos lin daŭre plibonigi la mirindan projekton.

Malgraŭ la kompreneblaj protestoj de esperantaj vikipediistoj kiuj klopodas produkti pene per homa laboro kvalitajn kaj lingve korektajn artikolojn kaj tiel verasence konkurenci kun la alilingvaj vikipedioj, mi tamen invitas ilin pripensi la utilon kiun Esperanto gajnus, se ili enmetus en la E-an vikipedion ankaŭ la rezultojn de WikiTrans, kompreneble kiel aparte signitan parton kun klara indiko ke temas pri aŭtomata traduko. Konsideru la jenon:

1. La artikolaro en Volapuko en Vikipedio kun pli ol 100.000 artikoloj estas komplete farita per aŭtomata tradukado, tamen ĝi ankoraŭ enestas en la statistikoj de Vikipedio kaj troviĝas inter la pli grandaj vikipedioj.
2. Per enmeto en la Esperantan vikipedion, la WikiTrans materialo kreskigus la E-an vikipedion al la dua loko en la mondo, kion sendube baldaŭ ĉiuj rimarkus kaj ĝi iĝus tre interesa fenomeno. Verŝajne grandaj publikaj medioj raportus pri tio. La afero estus grava el propaganda vidpunkto kaj supozeble instigus aron da homoj lerni E-on.
3. De tio sendube profitus ankaŭ la kvalita normala E-vikipedio finance kaj per nova personaro kiu povus kune kun sinjoro Bick daŭre plibonigadi la Wiki-trans-vikion kaj ankaŭ pligrandigadi la kvanton de jam komplete korektitaj kaj novskribitaj artikoloj en lingve korekte farita parto.

Zlatko Tišljar

Paĝo el WikiTrans:

Biografio de Robert Schuman

[redaktu] Frue jaroj



Tiu de Schuman hejme en [Scy-Chazelles](#), alproksimiĝu Metz, en Loreno, Francio

Schuman estis viro de pluraj kulturoj. Lia patro, Jean-Pierre Schuman (1837-1900), estis naskita en Évrange, [Loreno](#), ĵus trans la limo kun Luksemburgio. Jean-Pierre Schuman estis franca civitano sed post [alsaco-Loreno](#) estis aneksita fare de la [Germana Imperiestra Regno](#) en 1871, li iĝis germana civitano. La patrino de Roberto, Eugénie Duren (1864-1911), luksemburgano naskita en [Bettembourg](#), iĝis germana civitano de geedziĝo en 1884.

Schuman estis naskita en 1886 en [Clausen](#), antaŭurbo de [Luksemburgio](#) kiel germano per virto de la principo de [jussanguinis](#). Lia gepatra lingvo estis [luksemburgaj](#) sed li estis instruita [franca](#) kaj [Standard German](#) en la lernejo. Ĉar li lernis la francan nur en-lerneja (kiu estas deviga en Luksemburgio) li parolis ĝin kun klara akĉento. ^[2]

Schuman plutraktis sian sekundan edukon en la [Athénée de Luksemburgio](#) mezlernejo en Luksemburgio, iama [jezuito](#) kolegio. Li tiam decidis studi ĉe germanaj universitatoj, sed ekde la Luksemburgio mezlernejodiplomo estis ne valida en Germanio, li devis sukcesi [la alirekzamenon](#) ĉe la Kaiserliches Gimnazio en [Metz](#). Lia universitata eduko en leĝo, ekonomiko, politika filozofio, teologio kaj statistika tookloko en la germana eduka sistemo. Li ricevis sian jurgradon post studado ĉe la universitatoj de [Bonn](#), [Munkeno](#), [Berlino](#), kaj [Strasbourg](#) en Alzaco.

Post diplomiĝo kiun li iĝis advokato kaj estis elektita al la urba delegitaro de Metz.

Eŭropa Bulteno. 2010. № 10 (98) Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: 2010-11-02.

Redaktoro: *Zlatko Tišljar*

Kunlaborantoj: *Katalin KOVACS, Clauĉde Nourmont, Etsuo Miyoshi, Fabien Tschudy, Maja Tišljar, M^a Rafaela Urueña, Petro Chrdle, Sean O Riain, Stefan MacGill, Szilvási László*

Teknika redaktoro: *Raymond Gerard*

Leterojn kaj komentojn sendu al EEU:

Rete: ztisljar@gmail.com <http://www.gazetejo.org>

Ligiloj

- <http://edukado.net/ekzamenoj/ker>: UEA-KER
- <http://edukado.net/komunumo/forumo?f=62>: edukado.net forumo
- <http://edukado.net/novajhoj?id=36>: edukado.net novaĵoj
- http://en.wikipedia.org/w/index.php?title=Robert_Schuman&action=edit§ion=2: Editing Robert Schuman (section)
- http://en.wikipedia.org/wiki/Ath%C3%A9n%C3%A9e_de_Luxembourg: Athénée de Luxembourg
- http://en.wikipedia.org/wiki/Clausen%2C_Luxembourg: Clausen, Luxembourg
- http://en.wikipedia.org/wiki/File:Maison_de_Robert_Schuman_%C3%A0_Scy-Chazelles.jpg: File:Maison de Robert Schuman à Scy-Chazelles.jpg
- http://en.wikipedia.org/wiki/Humboldt_University: Humboldt University of Berlin
- <http://en.wikipedia.org/wiki/Jesuit>: Society of Jesus
- <http://en.wikipedia.org/wiki/Luxembourgish>: Luxembourgish language
- http://en.wikipedia.org/wiki/Luxembourg_City: Luxembourg (city)
- <http://epo.wikitrans.net/Abitur?eng=Abitur>: Abitur
- <http://epo.wikitrans.net/Alsaco-Loreno?eng=Alsace-Lorraine>: Alsaco-Loreno
- <http://epo.wikitrans.net/Bettembourg?eng=Bettembourg>: Bettembourg
- http://epo.wikitrans.net/Franca_lingvo?eng=French%20language: Franca lingvo
- http://epo.wikitrans.net/Germana_Empiro?eng=German%20Empire: Germana Empiro
- http://epo.wikitrans.net/Germana_lingvo?eng=German%20language: Germana lingvo

- <http://epo.wikitrans.net/Jussanguinis?eng=Jus%20sanguinis>: Jussanguinis
- http://epo.wikitrans.net/Ludwig_Maximilian_Universitato_de_Munkeno?eng=Ludwig%20Maximilian%20University%20of%20Munich: Ludwig Maximilian Universitato de Munkeno
- <http://epo.wikitrans.net/Metz?eng=Metz>: Metz
- <http://epo.wikitrans.net/Mozelo?eng=Moselle>: Mozelo
- http://epo.wikitrans.net/Robert_Schuman?eng=Robert%20Schuman#cite_note-1: Robert Schuman
- <http://epo.wikitrans.net/Scy-Chazelles?eng=Scy-Chazelles>: Scy-Chazelles
- http://epo.wikitrans.net/Universitato_de_Bonn?eng=University%20of%20Bonn: Universitato de Bonn
- http://epo.wikitrans.net/Universitato_de_Strasburgo?eng=University%20of%20Strasbourg: Universitato de Strasburgo
- <http://esperanto.sete2011.free.fr/irem.php?Lingvo=eo&Temo=Bonvenon>: Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo > Bonvenon !
- <http://esperantosete2011.fr/>: Esperanto Associations' meeting 2011 at Mediterranean Sea > Welcome !
- <http://eurotalk.com/en/store/learn/esperanto>: Eurotalk: Store - Learn Esperanto
- <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>: 78a Itala Kongreso de Esperanto
- <http://www.e-d-e.org/Respondo-de-la-Euxropa-Komisiono>: Lingva reĝimo de patentoj [2010-09-24]
- <http://www.edukado.net/>: edukado.net ĉefpaĝo
- <http://www.esperanto.cz/>: Esperanto.cz
- http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_content&view=article&id=330:18a-internacia-e-semajno-en-coma-ruga-tarragona&catid=52:Noticia&Itemid=156: esperanto.es
- <http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr>: 9-a "Novjara Renkontiĝo" (NR)
- <http://www.eu2011.hu/>: 2011.hu
- <http://www.europo.eu/>: Eŭropa Esperanto-Unio
- <http://www.eventoj.hu/>: La Esperanto-centro: EVENTOJ
- <http://www.gazetejo.org/>: La esperanta gazetejo
- <http://www.kava-pech.cz/esperanto>: KAVA-PECH
- <http://www.legifrance.gouv.fr/affichTexte.do?cidTexte=JORFTEXT000022360392&dateTexte=&categorieLien=id>: Arrêté du 31 mai 2010
- <http://www.liberafolio.org/Members/Halkom/la-perdita-diskuto-revenas>: Libera folio: La perdita diskuto revenas
- http://www.rojoynegro.info/2004/IMG/pdf/Proposta_de_resolucio_-_esperanto.pdf: Propuesta de resolución sobre el esperanto para el congreso de Catalunya
- <http://www.wix.com/dtisljar/euopo>: Eŭropaj valoroj

Notu ke en PDF dokumento, kelkaj ligiloj ne funkcias kiel atendite. Vi devos mem kopii kaj glui la ligilon en vian krosilon, En HTML-dokumentoj, ĉio funkcias bone.